

BULTENO de REU

№ 90, Septembro 2017



RET-2017 EN LA LOKO NE ENSORĈITA, SED ĈARMA

Ĉi-jare RET okazis inter la 2-a kaj 9-a de aŭgusto en la urbeto Poŝehonjo en Jaroslavlva provinco. Partoprenis ĝin 62 personoj. La elekto de la loko estis ne hazarda – la aranĝo estis dediĉita al 140-jariĝo de Ivan Ŝirjaev,

Esperanto-verkisto, tradikisto kaj iniciatinto-ĉefredaktoro de Enciklopedio de Esperanto. Li estis dum preskaŭ 30 jaroj vilaĝa pastro, kaj la prej proksima urbo de lia iama paroĥo estas ĝuste Poŝehonjo.

Honore la I. Ŝirjaev okazis Lego-tago kun prelegoj pri lia vivo, kreado, naskiĝloko kaj familio. Oni eksciis novajn faktojn; aparte impresa estis la ruslingva rakonto de Galina Burŝa – eksa direktorino de, bedaŭrinde, ne plu ekzistanta popola muzeo de la naskiĝvilaĝo de Ŝirjaev Vereteja. Krome, okazis ekskurso al lia iama loĝ- kaj servoloko Zinovjevo. La

vilaĝo ne plu ekzistas – nun tie estas arbaro, – la preĝejo estas forlasita kaj duonruinigita, kaj ne atingeblas per aŭtoj. Tial la lastajn 6 kilometrojn post fino de asfalto oni veturis tien tra terura koto per ĉaretoj, kiujn tiris traktoroj. En la restaĵoj de la preĝejo okazis liturgio honore al memoro de I. Ŝirjaev, kiun ĉeestis kaj esperantistoj, kaj kelkaj loĝantoj de proksimaj



lokoj; gvidis ĉion kelkaj pastroj el la Ribinska eparĥio, inter ili mem episkopo de Ribinsko Benjamenio. Li private konfesis, ke neniam tian travivaĵon ĝis nun spertis. La samon diris la partoprenintino el Kubo Alina Dolores Zuaznabal Himely. Necesas emfazi, ke ĉion tion iniciatis kaj aranĝis arda esperantisto kaj esploristo de la vivo de Ivan Ŝirjaev pastromonaĥo Taŭriono (Ilja) Smikov el Sergijev Posad.

Krom la Lego-tago, okazis sufiĉe enhavriĉa somera universitato kun la ĉeftemo “Idea, filozofia kaj religia fono de Esperanto”. Pri tiu temo prelegis Andreo Obtezkov, Nikolao Gudskov kaj Gennadij Basov. Pri aliaj diversaj temoj prelegis Mikaelo Bronŝtejn, Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Vladimir Opletajev k.a., troviĝis loko ankaŭ al eksterprogramaj prelegoj, ekz. de A. Zuaznabal Himely pri la kuba Movado.

Altan nivelon havis diversnivelaĵoj kursoj (elementa – de Mikaelo Ĉertilov, kaj brila konversa rondo de Irina Gonĉarova), ludoj, konkursoj... Varia estis la koncerta programo (M. Bronŝtejn, M. Povorin, ensemblo “Ekvinokso” en konsisto A. Obrezkov, E. Vorobjov kaj E. Sokolova, aŭtora prezento de diversflanka kreado de Ludmila Novikova). Pro la ne tro varma vetero ĉiuj aranĝoj estis aktive partoprenataj, do prelegantoj kaj aliaj aranĝgvidantoj ne plendis pro manko de atento flanke de la publiko.

Al ĝenerala kontento de la partoprenintoj necesas aldoni plezuron pro la loko – Poŝeĥonjo



ja estis dum jarcentoj kaj plu restas iu certa modelo de profunda rusa provinco (kvankam reale facile atingeblas de grandaj urboj). Tiu aŭtentika provinceco de ĉirkaŭaĵo aldonis apartan ĉarmon al la aranĝo, kion suplementis dum- kaj postaranĝaj ekskursoj al la urbo; al la vilaĝo Kukobojo (survoje al Zinovjevo), kiu estas proklamita naskiĝloko de Avino Jaga; al fama Romanov-Borisoglebsk (Tutaev) – kie la

ĉefpastro de la katedralo permesis al esperantistoj trejniĝi pri sonorigado sur la turo; al la, almenaŭ laŭ reklamo, la plej bela vilaĝo de Rusio Vjatskoje; kaj al la vere admirindaj urboj Jaroslavo kaj Kostromao.

Nu, kaj nepre menciindas la grava movada signifo de la aranĝo – ja kadre de ĝi okazis 29-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio (32 registritaj delegitoj), kiu provis pritaksi la ireblajn vojojn por evoluo de la organizo. La Konferenco elektis la 7-kapan Estraron gvide de la denove elektita Prezidanto Svetlana Smetanina.

Nikolao Gudskov

Decidoj de la 29-a Konferenco de REU

okazinta en la urbo Poŝeĥonjo (Jaroslava provinco) 06.-07.08.2017
(partoprenis 32 registritaj delegitoj)

La elektitaj gvidorganoj:

La Estraro:

Svetlana Smetanina — prezidanto

Nikolaj Gudskov — vicprezidanto

Mikaelo Ĉertilov

Irina Gonĉarova



Aleksandr Lebedev
Aleksandr Mitin
Vladimir Opletajev

La kontrol-revizia komisiono:
Gennadij Basov — kunordiganto
Valentin Seguru
Aleksandr Milner

Komisiito pri dokumentaro - Viktor Aroloviĉ

La konferenco decidis:

1. Laŭdi la agadon de MEA MASI en la raporta periodo kaj rekomendi al la kluboj-membroj de REU studi kaj sekvi la spertojn de MEA MASI.
2. Apogi Esperanto-ekzamenon en Rusio
3. Okazigi en la jaro 2019 internacian aranĝon en Rusio: antaŭ- aŭ postkongreson de UK kaj (eble, en 2020) SES-Rusio-2.
4. Apogi okazigon de Aktivula Maturiĝo en Rusio.
5. Daŭrigi la agadon pri eternigo de memoro de Ludoviko Zamenhof en Moskvo kaj aliaj urboj okaze de Zamenhof-jaro.
6. Krei fonduson pri subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev
7. Subteni informe la laboron de Ja. Kikavec pri internacia tradukado pere de Esperanto.
8. Esplori eblecojn pri okazigo de RET-2018 en teritorio de Rusio. La limdato por proponoj estas la 1^a de oktobro.

Protokolo de la 29-a Konferenco de REU

Saluta vorto de SS(metanina). Ŝi komisiis al NG(udskov) gvidu la konferencon kiel al vicprezidanto.

NG: Komence necesas konf. organojn elekti.

Protokolkomisiono.

Protokolanto. AM(itin) konsentis. Ĉu konsentas aliaj Jes.

Kalkulkomisiono. 3 pers. Zaharova, Zozulja, Milner. Unuanime.

La konf. estas malfermita.

MĈ(ertilov): Registriĝis 28 ĉeeste, 2 distance, do 30.

NG: Raportoj de aktivuloj pendas sur la muro.

Estos raportoj de Prezidanto kaj vicprezidanto kune.

Registriĝis ankoraŭ 2 personoj. Entute 32.

SS raportas.

Prezantas estraranojn kaj eks-estraranojn.

Pri aferoj en Kazano.


Pri Krimeo kaj UEA.

Pri reregistriĝo de REU kaj frenezaj reguloj (restu samaj).

NG aldonas, kial li estas “oficiala estro” ekde reregistriĝo en 2002, tion ŝanĝi postulas superi grandajn burokratojn barojn.

Klarigado pri juraj aferoj.

Sekva parto — pri impostoj. Malregistrado. Kunpuŝiĝo de la leĝoj. (ЕГПЮИ)



Citaĵoj el la letero (pri impostoj). Nun ĉio estas en ordo, la jura stato de REU renoviĝis. Letero de REU funkcias en konsulejoj de ĉiu lando. Pro tio necesas havi juran staton.

MĈ aldonas pri alia sfero: fondo de komisiono pri eksteraj rilatoj. Preparan laboron. 3 prelegojn en la Akademio de Sciencoj. Publikigitaj. Renee Triolle vizitis. UNESCO. Jaro de Zamenhof. Provis fari telekonferencon.

VS(eguru) demandas pri la kajo en Kazano. La ideo. Resp.: oni kolektas subskribojn. SS legas la respondon al la letero pri starigo de memortabulo en Moskvo pri Zamenhof. Sur konstruaĵoj de la Universitato — ne eblas jure. Preskaŭ ne eblas pruvi, ke Z. loĝis en iu domo.

VS: eluzu la eventon: 100-jariĝo de forpaso de Z. Do necesas trovi nenomitan lokon. Iu ajn povas turni sin.

NG aldonas. Pri bultenoj de REU.

Demandoj

IG(onĉarova): Interrilatoj inter REU kaj REGo. Al kiu sendi?

NG: “Oficialajn rilatojn ŝiras, sed...”

LN(ovikova): Garik ne publikigas materialojn pri KET, sed se en la Bulteno, do bone.

Milner demandis. Unio ne estas *общественная организация*. Se “unio” bankrotas, do membroj devas kompensi

— Ne enmiksiĝu, estas juraj strangaĵoj.

Ni estas *общественная организация* kun la nomo enhavanta la vorton “unio”.

VO(pletajev) demandas pri la Bulteno.

IG postulaj raportojn pri komisiitoj. VM(inin) pretas.

VM: Regiona agado kaj Azia (asocio?)

Ne supozas, ke regiona agado koincidas kun la klubo.

IG: Ĉu estas difino, kio estas “regiona agado”?

VO: En la statuto ĉio estas, sed ne funkcias.

VO: Ĉu vi kontaktis regionajn reprezentantojn?



SS: Ĉu kun Piter?

VM: Ili rifuzis kunlabori.

IG: Kiel? En kiu formo?

VM: Ili forpelis min el la grupo.

RK(udrjavceva): Vi ne komprenas, kio estas la laboro.

SS: Volgogrado!

RK: Vi miksas regionan agadon kun via dissendolisto.

VS(picina) rakontas pri Volgograda agado.

Skvaron de e-istoj.

IG: por fini... Pri sia interkorespondado.

NG: Mi ripetas, nu sendu materialojn, simple informetojn.

GB(asov): Mi opinias, ke necesas paroli pri agado, kiu donas profiton.

NG: Sed Minin mem konstante raportis pri sia agado.

IG: Mi ne komprenis Geĉjon.

GB: Rezulto estas — do estas profito.

VM: Ĉu mi povas daŭrigi?

VO: Sola homo ne povas efektiviĝi regionan agadon. Necesas reprezentantoj.

RK: Tion faris Grigorjevskij.

MĈ: Mi proponas fari retan konferencon inter kluboj. Li diris, ke estas ne lia agado.

NG: Reprezentantoj estis, sed nenion faris. Nun vere se estas unu homo komprenanta la sencon de la laboro, do sufiĉa.

VM: daŭrigas. Terentjeva rifuzas kunlabori. IG forbaris min.

IG: Ne mi, sed en la estraro de la listo estas 6 homoj.

SS: Ĉiuj vin forbaras.

IG: Private mi ĉion klarigis.

VM: Pri Azia parto.

SS pri ebla konferenco, “estis malfrue, la raporto de vi venis malfrue”.

PAŬZO

JK(uznecova) raportos pri laboro de Kontrol-Revizia Komisiono (KRK). (Reala laboro mankis).

SS rakontis pri kasistoj. Laŭdas Aleksandron Lebedev-on.

Estis 2 kunvenoj.

Alio — en la raporto. Donu nunajn adresojn.

Pri REJM.

Pri Kirill Noviĉenko. Kvazaŭ li estis reprezentanto.

Li rifuzis ion ajn fari ene de REU/REJM

IG: Mi parolis kun Kirill. Li ne estas organizanto en la karaktero.

AM: Ĉu REU rajtas sendi ion de REJM?

SS: Ni rajtas malfrostigi REJM.

AM: TEJO estas stranga organizo kun strangaj reguloj aŭ ĝi rompas ilin.

Parolado pri mono. Ne estas konto, estas kasisto.

Pri Revizia komisiono.

VS: Sola tasko estas ricevi la raportojn.

VO: Ne estas sola. La tutan agadon de Estraro vi kontrolas.

VS: Ni akceptas kritikon ĉiam

IG: Sekvan fojon ni simple devas konsideri ĉion.

VO: Ĉu vi protokolojn kontrolojn?

IG: Homoj ne komprenas siajn funkciojn.

LN(ovikova): Necesas fari regularojn.

VO: Decidoj de 28^a estas ridindaj, neniu decidoj, io sapa...

LN: Ne regularo, do reglamento devas esti.

VS: Konklude mi proponas, ke KRK aligu al REU-estraro al aparta listo por kontroli.

IG: Nur decidojn.

RK: Iam eĉ estis akceptita la decido, de dufoje dum la jaro aperu la plena raporto.

VO: Ukrainianoj ĉion protokolas kaj enrete publikigas.

NG: Rezulte, la raporto de KRK ne okazas.

VO: Laboro de ĝi estas ne kontentiga.

NG: Pritaksi laboron de la Estraro. Voĉdonigi.

IG: Ne temas pri komisiitoj:?

— Ne.

NG: Ĉu kontentiga aŭ ne?

Ĉu kontentiga laboro de la Estraro? Unuvoĉe.

Nekontentiga? Nulo.

Sin detenis? 2.

Do, laboro de la Estraro estas pritaksita KONTENTIGA.



NG: Pri regiona agado.
Kontentiga? 9
Nekontentiga? 4
Sin detenis? 12

IG: Mi postulas pritaksi ĉion.
KRR.
Ĉu kontentiga?
VS: Mi kontraŭas tiun starigon: kontentiga aŭ ne.
BZ(ozula): Mi proponas ne pritaksi.
IG: Mi insistas!
Kontentiga: Neniu (unu enreta)
Ne kontentiga: 8
Sin detenis? 16

Aliĝintaj kolektivoj.

NG: Mi petas skize raportii...

VO: Mallonge fiksi tiun tempon, 2 minutoj.

IG: Ne konsentas, por mi ne eblas du. Almenaŭ 5.

NG: Raportu. Ira, mi donas al vi la voĉon.

IG raportas¹. MASI agas ekster REU, sed estas ĝia parto.

VO: Mi proponis laŭdi MASI kaj studi ĝian sperton.

NG: Voĉdonigu.

LAŬDI LA AGADON DE MEA MASI EN LA RAPORTA PERIODO KAJ REKOMENDI
AL LA KLUBOJ-MEMBROJ DE REU STUDI KAJ SEKVI LA SPERTOJN DE MEA MASI.
Por – unuanime (same en Interreto).

NG: Kiu ankoraŭ volas raportii.

RK(udtjavecva): Mi povas, sed ne devas. Sed... (raportas) (aparta dosiero)

Proponis du temojn: mia vojo en Esperanto kaj... Ricevis tekstojn.

VO: Mi ne raportos, do rimarkon mi havas. En Uralo ne estas iu oficiala organizo, kiel MASI.
Do kiu “ni”? Kio estos post ni, mi ne scias.

Regionaj kunordigantoj devas ekzisti, kaj la Estraro devas tion prizorgi.

NG: Ĉu ankoraŭ estas?

VM: En Tomsko estas klubo, sed ne membro de REU.

IG: Kial?

VM: Ĉar la prezidanto estas kontraŭ.

IG: Kial?

VM: Mi ne scias.

IG: Estas baza demando.

RK: Niaj gejunuloj neniu tiun formalajon ŝatas. Ni ne havas membrecon, nek statuton.

Nur dank² al mia insisto ni estas...

NG: En “Lev Tolstoj” ĉiuj estas individuaj aŭ dumvivaj membroj kron kelkaj principaj
kontraŭuloj membriĝi, kiel Klara [Ilutoviĉ]. Do, ne estas senco en la tutkluba membreco.

VO: Vladimir diru, ĉar la movado en Siberio reviviĝis.

NG: Poste en pridiskutoj kaj planoj.

SS: Estas ankaŭ kluboj... Ĉu ili? Nina, ĉu vi volas?

NO(melĉenko): Nia klubo estas nova. (raportas). Novoĉerkasskaj Esperanto-Tagoj. (ili sendis la
raporton). (legas)

NG: Ĉu iu volas ankoraŭ?

¹ La raporton vd. fine de la protokolo kiel suplementon.

JK(uznecova): Klubo en Samara ekzistas, kuniĝas ni tre malofte.

Sed ni havas esperon, ke aŭtune ni organizos kurson. Ni ricevis senpagan ejon. Troviĝas dezirantoj.

VC(vetkova): (raportas pri Kariljono). Ĝi okupis lokon en Petropavla fortikaĵo, karavananoj vidis.

VS(picina): (rakontas pri Volgograda klubo): faris aperojn por loĝantoj de urbo. Ŝakturnirojn. Por virinoj. Aparte por infanoj. Dum 9 jaroj. Kaj rakontas pri e-o kaj la urbo.

MĈ: Ĉu vi scias, ke en reu.ru estas paĝo de via klubo?

VS(picina): Ne...

MĈ: Eksteraj homoj vizitas. Sed tie neniuj informoj, nek adreso, nek rakonto. Oni rigardas nian paĝon.

NG: Ni aŭskultis tre interesajn raportojn, homoj konatiĝis...

Nun ni devas jam transiri al la plej interesa kaj intrigoplena parto — elektado de Prezidanto.

Almenaŭ ni devas prepariĝi.

IG: Mi legis, ke K. Arbekova proponis sin.

NG: Misa. Ŝi mem sin ne proponis, iu persono ŝin proponis. Ŝi ne rajtas esti proponita.

SS: Ŝi ne kotizas dum KELKAJ jaroj. En Seulo mi parolis... Ŝi diris, ke min volis Minin ŝovi tien.

IG: Programojn! Ŝi povus jam aliĝi.

MĈ: Eĉ distance ne...

NG: Kiuj estas la proponoj.

IG: S. Smetanina

VS: Ni devas kelkajn kelkajn nkandidarojn.

NG: Ne malpli ol du. Ni ne estas iu maldemokratia UEA kun elekto de unu el unu.

VS(eguru): Ĉertilov.

VZ(aĥarova): Gonĉarova

GB(asov): Minin.

NG: Ĉiuj kandidatoj laŭ ordo diru, ĉu ili konsentas.

SS: Konsentas

MĈ: Konsentas.

IG: Ne konsentas. Ne estas mia sfero.

VM: Unue — ĉu usona civitano rajtas kandidatiĝi? (Ankaŭ rusia — jes) — Jes aŭ ne?

VM: Se mi loĝas en Tomsk...

MĈ: Ne gravas.

Solovjov: Ĉu mi povas proponi NG?

VM(inin): Estas du pli taŭgaj kandidatoj. Ne konsentas.

NG: Du kandidatojn, kiuj konsentas ni havas. Rondigi unu ciferon en la balotilo:

1. SS

2. MĈ.

SS: Kie estas la urno? Ĉu la ĉapelo?

VS: Ni ne diskutis pri la programoj! Kion vi proponas?

PAŬZO POR VOĈDONI

NG: La balotado.. kiu ne balotis?

Ĉu ĉiuj?

AM: Ni atendas ankaŭ interreton.



NG: La kalkulkomisiono kalkulas

Interreto voĉdonis.

Sume — 27, 1 distance

Por SS — 17

MĈ — 10

ne validas — 1.

NG: Ni finas la unuan tagon de la konferenco. Gratulas SS pro la elektiĝo.

Voĉdonado por la Estraro.

SS: Mi proponas N. Gudskovon, M. Ĉertilovon, A. Mitinon, V. Opletajevon, I. Gonĉarovan.

VM: Kiom da personoj devas esti?

— Minimume 5.

MĈ: Mi proponas aldoni A. Lebedevon.

AL: Kion mi faros?

MĈ: Okupiĝos pri financoj.

AL: Mi ne estas iniciatema.

SS: Estas tre respondeca.

MĈ: Mi estis kaj kasisto, kaj estrarano. Estas utile. Vi partoprenos diskutojn.

VS(eguru): Ĉu ni elektu vicprezidanton?

— Aparte.

SS: Ĉu por la kvanto vi konsentos?

— Ĉiuj.

GB: Prez. devas diri, ĉu laborkapabla la estraro aŭ ne. Ne alkroĉiĝu al la kvanto.

NG: 2 proponoj: 5 (IG) aŭ 7 (SS).

Por 5: 4

(Por 6: 1)

Por 7: 20

Sin det.: 2

Do, estu 7-homa Estraro.

Ĉu ni elektu vicprezidanton?

Por: 25+1

Kontraŭ: 2

Sin det.: 1

NG: Proponoj estu el la listo.

MĈ: N. Gudskovon.

VS: Estu 2 vicprezidantoj.

NG: Ĉu aliaj same opinias?

— ne.

Por NG: 26

Kontraŭ: 3.

Sin det. neniu.

Pri estraranoj. Ĉu ĉiuj konsentas elektiĝi?

MĈ: konsentas.

AM: konsentas.



VO: mia aĝo... Tamen konsentas.

IG: Ne...

— Kial?

NG: Vi estas tre bezonata. Via tasko estas diri vian opinion. Kaj en la Estraro povas hazarde aperi stultaj opinioj, necesas balanci ilin per saĝa. Do vi ĉiam diros ion saĝan.

IG: Mi povas klarigi. Mi estis iam en Estraro, mi ne estas kompetenta.

Mi devus la tutan MASI-kogorton aligi al REU. Sed mi ne deziras. Mi volas apartan organizaĵon.

NG: Vi restos sama, neniuj vin devigas. Sed via voĉo en komunaj decidoj estos signifa.

IG: Se vi ne devigos enigi MASI-agadon en REU-agadon, mi konsentos

NG: Kiu estas por: AM, MĈ, IG, VO, AL.

por 27+1

kontraŭ: 0

sin det. 0.

DUA TAGO

Ĉeestas en la komenco 20 personoj

Elekti KRK kaj komisiitoj

VS(eguru): parolas pri unu el punktoj de la Statuto. Se hieraŭ estis 27 (32) homoj... ne estis ajna decido akceptita, se granda plimulto akceptita (temas pri “kontentiga” voĉdono).

SS: Sindetenantoj ne estas kalkulataj.

NG: Estas. Do ne estas absoluta plimulto. Sekve, VS pravus, la decido pri nekontentiga laboro de KRK ne estis akceptita.

NG: elekto de KRK. Estas la demando, ĉu ni bezonas 3 personojn aŭ sufiĉas unu?

BZ(ozula): Mi tuj faras proponon — organizi junularan sekcion.

MĈ: FORMALE ĝi ekzistas.

VS(olovjov): Necesas ŝanĝi la aĝan plankon (ĝis 35).



NG: Ĉu 1 aŭ 3 personoj?

RK(kuznecova): Ne elektu unu, ĉar jen estis elektitaj 3, restis unusola (mi, RK)

NG: Do 3. Laŭ tiu logiko ni ne voĉdonu pri la kvanto. La proponoj por homoj? Preferindas ĉeestantoj.

BZ: Seguru.

RK: Milner

VS: Kuznecova.

SS: G. Basov. Sed li devas ĉeesti.

VS(olovjov): Rajsa Kudrjavceva

RK: Mi rifuzas

SS: Novikova

LN: Ne, ne, ne

GB (telefone): Kiel membro mi pretas esti, kiel estro ne.

SS: Zozulja

BZ: Permesu al mi pensiuliĝi

LN: Ne estas sperto ĉe mi

NG: Do la prezidanto de TCЖ ne havas spetron..

— Valja.

SS: Ĉu ni voĉdonu aŭ esta proponoj? Seguru, Milner, Basov

VS: Ĉu estas aparta voĉdono?

LN: La elekto ne estas, do liste.

NG: Ankaŭ pri tio ni voĉdonu.

Por individue: 1

Liste: 22+1

Sin det. 0

(Venis VMinin)

Por la konsisto: 22+1

Kontraŭ: 1

Sin det. 2

NG: En la protokolo devas esti ankaŭ prezidanto.

VS: Poste ni renkontiĝos kaj decidus inter ni, kiu estos la prezidanto aŭ kunordiganto.

NG: Elekto de funkciuloj.

Pri dokumentado. Estis Aroloviĉ, li ne rifuzas.

Por: 23

Kontraŭ — 0

Sin det. 0

NG: Pri junulara afero. Pasintkonferencoj ni elektis tiaspecan komisiiton, li eniris Estraron, kaj jen baldaŭ eliris. Ĉu denove elekti?

Fakte ĉeestas nur unu homo sub 30 — Lebedev (AL). Sed li ne emas gvidi REJM.

La Estraro disdividas inter si la plenumotajn taskojn:

NG — bulteno, ĝenerala helpo

MĈ — eksteraj rilatoj

VO — instruistaj aferoj

IG — regiona agado

AL — financoj

AM — paĝaro, registrado.

IG: Mi deziras rakonti, kiel mi intencas komencan laboron, skribi regularon («положение») pri regiona agado. La dua paŝo — plano de laboro. Laŭmonatan, aŭ iel, kiel agi. Ĉiuj ricevos oficialan leteron de REU kun la demando. Bv. ne neglekti, respondi.

Mi tre ŝatus helpi al VO organizi instruistan agadon

VO: Ankoraŭ mi ne prezentas la planon.....

NG: La sekva demando: Komisiitoj kaj bezono de tiuj komisiitoj.

Aparta komisiito pri junularo estu, sed ĉu vi konas taŭgan kandidaton?

RK: Mitin?

SS: En estraro.

BZ: Se IG ne estus estrarano, mi proponus...

NG: Pri REJM respondecu homo sub 30.

RK: Noviĉenko

SS: Li diris, ke ne kapblas.

NG: Ni ne havas kandidatojn. Kiam troviĝos, do...

NG: Ankoraŭ kiuj gravaj komisiioj beonatas?

VM(inin): kun KM

Azia KM devas kontakti iun.

MĈ: Do la Estraron.

NG: Kiuj estas proponoj?



MĈ: Por ĉiuj direktoj estu homoj, sed li devas mem proponi sin.

NG: Unu Aroloviĉ, kaj dume sufiĉas. Pri junularo dume la demando plu pendos.

SS: Al projektoj de la Estraro.

SS: KER estis, sed Kovacs demisiis. Ni ne volas halti, daŭre necesas esplori, ĉu ni povas organizi ekzamenojn je la landa skalo.

Dua punkto estas SES-2-Rusio en 2019. En la sama jaro okazos UK en Finnlando. Eblas organizi antaŭ- aŭ postkongreson. Eble ŝipumi el SPb al Msk aŭ male.

Sekvajara RET. Jam ĝi tradiciigis. Ĉu estas sinproponoj, kiu klubo povus preni la respondecon?

VM: Mi proponas Arbekovan, ŝi serĉas lokon por RA. Eblas kunigi.

SS: Ni devas ŝin aŭskulti. Ŝi volas organizi RA en fora loko.

VM: Ŝi ankoraŭ ne decidis.

SS: Aktivula Maturiĝo (AMo) por Rusio. Sed mem ni ne rajtas fari, necesas trejnistoj de UEA. Ni devas fari ĉu aŭtune, ĉu vintre. Se estos trejnonto... pripagi. Antaŭvidata estas iom da mono de UEA.

Pli ol 30 seminarioj estis en la mondo. Homoj meritas... ne gapantoj kaj konsumantoj, sed aktivuloj.

NG: Preferindas ne pensiuloj. Por novaj homoj.

SS: Minimume 15 homoj, veraj aktivuloj.

IG: Priparoli AMon, elekti temon plej bezonatan.

VM: Baldaŭ okazos tutmonda junulara festalo en Soĉi.

MĈ: Ni jam diris... Organizantoj rifuzis nian partoprenon.... Bela "otpiska".

SS: Estas Nadikova, estrarmino de ILEI, ILEI proponis sin, Noviĉenko ion faris...

IG: Mi kun li parolis. TEJO estas akceptita. Noviĉenko devus ion organizi. Li ne turnis sin al REU, nek al MASI. "Jam ĉio estis malfreue". Ili havos homojn de TEJO, li ne kunordigis.

De E-o io povus okazi flanke de TEJO. Dume estas nulo.

MĈ: Nur partoprenantoj, sen programero?

SS: Nadikova: TEJO jam turnis sin al la komitato, ILEI ne iru laŭ la sama vojo.

VM: Venu memstare, ni iros al programeroj.

MĈ: Nu vizitos vi kiel gastoj.

LN: Ĉemizoj.

SS: Flagoj...

MĈ: Sed la programon ni ne eniros.

VS(olovjov): Soĉi-n viziti, kolektiĝi, lui, komune viziti aranĝojn.

IG: Plu trakti kun Noviĉenko, puŝi lin.

SS: Kiu venos al Soĉi, kiu planas... 2-3 personoj.

VS(eguru): Se Noviĉ. ne kapablas, do turnu ni nin rekte al TEJO.

NG: Ĝuste li estas TEJO.

SS: Kiu ankoraŭ havas ideojn.

VS(eguru): Ŝokita mi estas, kien mi alvenis. REU transformiĝis al veterana klubo. Venis tempo ne diskuti pri ordinaraj aferoj, sed por kontraŭkriza programo.

Nur unu junulara klubo estas (aŭ du). Ĉu sufiĉas por granda Rusio?

Necesas instruistoj, ekzamenoj por instruistoj ktp. Necesas lernolibro.



IG: Ĉu estas senco fari VS(eguru) komisiito?

MĈ: VS estas membro de komisiono pri eksteraj rilatoj, kiu ne ekzistas, sed mi volas ĝin krei. (Ankaŭ JZ(ajdman) ĝin enirus). Skribi pri subteno de tio.

Subteni kreon de Komisiono pri eksteraj rilatoj:

por - 25

kontraŭ, sin det. 0.

VO: Ŝevĉenko anoncis verkon de unua parto de la lernolibro.

NG: Ankoraŭ estas verkata, sed mankas tempo. 2/3 estas verkitaj.

VO: DŜ ne estas membro de REU.

MĈ: Necesas ja por lernejoj. Ĉar por studentoj jen estas de IG jam aprobita lernolibro.

SS: Por oficiale instrui necesas Ministeria aprobo. Sed ili neniam...

VO: Multe kostas

SS: Ankaŭ komplikos diplomigi niajn instruistojn. Trovi superan institucion, kiu konsentos aprobi.

NG: pri diplomo de ĈALK – ĝi normale funkciis en lernejoj, aldone al instruista diplomo.

Sufiĉas same KER-diplomo.

SS: Ĉiuj el vi kapablas, sed... Necesas pedagogia klero.

VS: En ПАЙОHO: necesas instruisto (klara) kaj la lernolibro.

IG: Necesas sobre rigardi, kien ni iros, kiu nin bezonas/atendas.

SS: Ni komence devas ellabori komunan programon por la tuta lando.

NG: Lingvistika Universitato diros, ke por tiu aĉa bagatelo ne necesas la programo

SS: Dekomence eksperimentaj placetoj, instruu, kaj poste eble provi oficialigi.

IG: Iri de malsupre, per alia vojo. Kolekti dezirantojn inter studentoj.

VO: Osokin petis helpon por vortaro de Kondratjev.

NG: Mi al li diris, voĉigu al la konferenco. Li ne interesiĝis fordoni la proponon por la konferenco.

IG: Kial bezonatas formalajoj? Ili ĉiam parolas pri tio.

NG: Sed sen konkretaĵoj.

IG: Kondratjev malsanas, mizeregas, kaj vi atendas skribaĵon.

NG: Ne skribaĵon, sed konkretaĵon.

IG: Finance subteni el kaso de REU.

MĈ: Fonduso necesas.

SS: Do fari la fonduson.

IG: Je nomo de REU.

LN: Sur paĝaro de REU fari anoncon.

MĈ: Formuli por la propokolo.

SS: Ĉu fonduson aŭ libervolan helpon?

IG: Kia diferenco?

NG: Libervola — ne klaras, kio, kiu, por kio. Fonduso — ni kontrolas, raportas, “jen tio por matenmanĝo, tio por paĝaro”.

“KREI FONDUSON PRI SUBTENADO DE LABORO PRI LA VORTARO DE B. KONDRATJEV”.

Por — 25+1

MĈ: (legas proponojn). N. Omelĉenko kion volas de REU?

NO(melĉenko): Nur informoj.

MĈ: Jaroslav Kikavec el Tverj, internacia tradukado pere de Esperanto. Ĉu ni devas fari decidon?

IG: Decidu anonci tion en REU-paĝaro...

MĈ: Mencii en decidoj, atenti, proponi...
IG: Inviti homojn partopreni.
Disvastigi la informon tra REU-kanaloj.
INFORME SUBTENI

MĈ. Dua propono de Francio (Saladin). Por informo.
Ankaŭ de Vl. Levadnij. “Tehnokom”.

PAŬZO

SS: Elekti liman daton por proponoj por RET-2018.
IG: Mi proponas Novoĉerkasskon.
MĈ: 1^a de oktobro.

IG parolas pri projekto: ILEI havas “Jaron de Lernanto”.
Estas ke ĉiu lernanto devas ricevi 1-horan lecionon de Eo

NG: Venas kritikoj, ke en BdR aperas bagatelaj informoj. Karaj miaj, de MASI aŭ iu alia serioza — ne bagatelaj. Ju pli da informoj venos...

VO: Ili estas ne kontrolitaj...

NG: Informoj pri kluboj dependas de la kluboj.

VO: en la BdR estas samo kun aliaj dissendolistoj.

VS: Ĉu eblas en REU-paĝaro meti ligilojn en aliaj lokoj.

IG pri Esperanto – Pervij kanal.
Poste pri la Poŝtkrucigo.

Propono paroli pri AM-o.

VS: Propono en reu.ru fari apartan literaturan paĝon.

AM: Propono fari teknikan taskon por estonta REU.ru.

IG: Parolas pri AMo. Prezentas ĝian signifon.

AM-o estas ne pri edukado kaj instruado, sed pri strategio kaj praktiko de E-informado. Kiel organizi lokajn grupojn, gvidi teamon. Kiel altigi la prestiĝon de Eo. Konsciigo de nia lingvo... Junigi la komunumon

Por okazigi AM en Rusio.
por — 21+1
kontraŭ, sindet. — 0

LN: Kiel kontraŭstari al negativaj politikaj influoj ...

VS(eguru) Kiel eduki aktivulojn — devas esti komencanta aktivulo ekde sia juneco.

TV(torova): Kiel altigi prestiĝon de Esperanto, precipe en lernejoj?

1. Kiel kontraŭstari negat. polit. influojn.
2. Modeloj de la kluba agado
3. Kiel eduki aktivulojn
4. Aktivigo de klub. agado
5. Alvoki junularon
6. Kiel altigi prestiĝon de Esperanto, precipe en lernejoj?
7. Kiel evoluigi E-kulturon.

SS: La konferenco pasis aktive, fruktodone, amikeme. Estu la periodo pli prospera ol la antaŭa.
Dankegon al ĉiuj.

Protokolis Aleksandro Mitin

RAPORTO pri agado de MEA MASI dum la periodo 07.2015-07.2017 por la 29-a Konferenco de REU 02-09.08.2017, u. Poŝehonjo (enkadre de RET-2017)



Moskva Esperanta Asocio MASI (plue - MASI) estas kolektiva membro de REU pere de 9-5-7 membroj el siaj 42-43-41 ĉiujare kotizantaj membroj respektive en la jaroj 2015, 2016 kaj 2017. Ĉiuj siaj aktivaĵoj MEA MASI iniciatas kaj okazigas sendepende de REU, tamen konsideras tiujn partoj de la Rusia E-agado kaj pro sia kolektiva membreco en REU ankaŭ REU-agado.

Tradiciaj aranĝoj ĉiujaraj

1. Januaro. Baza E-kurso FaRo. (vd en Instuado)
2. Februaro. Tradicia tritaga esperantlingva mergiĝo APERo-10 kaj APERo-11 (Apudmoskva Jerŝovo) kun partopreno de averaĝe 33 esperantistoj de kelkaj urboj kaj eĉ landoj. Ĉefaj organizantoj: Irina Gonĉarova kaj Aleksandr Basov, kun aktiva helpo kaj programkontribuo de deko da masianoj.
3. Marto. Daŭriga E-kurso (vd en Instuado). Partopreno en printempaj lingvaj festivaloj en aliaj urboj kun prezentado de Esperanto. En la raportata periodo: Ijevsk, Minsk, Permĵ.
3. Aprilo. Lerneja Lingva Festivalo en Kaluga, kie MASI estas la ĉeforganizanto. Dum la festivalo masianoj ĉiam prezentas Esperanton (en 2016 - Irina Gonĉarova, en 2017 - Pjotr Fedosov).
4. Majo. Amika ĉiujara renkontiĝo VsPLESk en u.Pljos, organizata de esperantistoj por si mem kaj por siaj geamikoj kaj konatoj. Enkadre de ĝi foje pasas prelegoj pri Esperanto aŭ iuj aranĝoj, ligitaj kun Esperanto. Kunorganizas (helpante al la ĉeforganizanto Pavel Volkov, u.Ivanovo) Irina Gonĉarova.
5. Junio. KER-ekzameno (vd Instruado).
6. Julio-Aŭgusto. Partopreno en eksterlandaj kaj enlandaj E-aranĝoj. En 2015-2017: RET, KET, BET-52, SES, UK, ILEI-Konferenco kaj aliaj.
7. Septembro. Baza E-kurso FaRo (vd Instruado).
8. Oktobro. Partopreno en aŭtunaj lingvaj festivaloj en aliaj rusiaj urboj kun prezentado de Esperanto. En la raportata periodo: Ĉeboksari (Irina Gonĉarova) kaj Granda Novgorodo (Irina Gonĉarova kaj Pjotr Fedosov).
9. Novembro. Preparado kaj organizado de la Moskva Lingva Festivalo, inkluzivanta multajn E-aranĝojn. (Vd malsupre).
10. Decembro. Zamenhof-Tago kaj Tago de E-Libro – ankoraŭ ne stabiliginta (vd malsupre).

Instruado

1. Okazis 5 bazaj paroligaj E-kursoj FaRo-44/48, po 2 ĉiujare (januaro-februaro kaj septembro-oktobro), en kiuj lernis respektive 7,7,7,6 kaj 8 komencantoj, sume 35 novuloj. Instruis Irina Gonĉarova.
2. Deko da homoj perfektigis en 2 daŭrigaj (gramatikaj) kursoj. Instruis Irina Gonĉarova.
3. La du sesiojn (2016 kaj 2017) de KER-ekzamenoj pasis 14 masianoj kaj finintoj de ĉeMASIaj E-kursoj. Oficiala kunorganizanto - Irina Gonĉarova. Ambaŭfoje la KER-medion organizis masianoj (ĉefe Aleksandr Basov), en 2017 multe kontribuis Sofja Zareckaja.
4. En januaro 2017 Irina Gonĉarova okazigis publikan interretan vibinaron pri Esperanto enkadre de maratono pri lernado de diversaj lingvoj.
5. De januaro ĝis majo Irina Gonĉarova laboris en la projekto de edukado.net EKPAROLU!, kie okazigis pli ol 30 parolsesiojn kun lernantoj el plej diversaj landoj.

Internaj aranĝoj

1. En 2015 regule pasis MASI-kunvenoj (№8-14 – julio-novembro) en Belinskij-biblioteko. Teknika organizanto – Aleksandr Basov.
2. Ekde novembro 2016 ĝis julio-2017 ĉiumonate okazas kunvenoj de la Esperanta Parola Klubo (EPoKo), kiu fakte anstataŭis klubajn kunvenojn.
3. Seninterrompe ĉiumonate okazas Rondo de Legado – ruslingva aranĝo pri legitaj libroj.
4. Ekde aprilo-2016 pasas MIABRAMO – MASI-kunvenoj unufoje dum du monatoj en la daĉo de la masiano Mikaelo Abramoviĉ – kun abundaj regalaĵoj kaj amuzaĵoj, tutplene preparitaj de la gastiganto. 5. Ekde 2016 pli-malpli regule okazas tabloludoj en loĝejoj de masianoj.
6. De 4 ĝis 7 masianoj partoprenadas en E-sumoo – la internacia projekto pri librolegado en Eo, iniciita de japana esperantisto Hori Jesuo.

7. MASlanoj senpage gastigas enlandajn kaj eksterlandajn esperantistojn, renkontiĝas kun esperantistoj, preterveturantaj Moskvon. Ĉi-kampe aktivas Irina Gonĉarova, Aleksandr Lebedev, Natalja Laziĉ, Morgan Malie kaj Viktorija Prijmak.

8. La 29-an de aprilo kaj la 3-an de majo 2017 Julija Samsonova, kiu staĝis en la ĉefa moskva ekspoziciejo "Maneĝ", okazigis tie du ekskursojn en Esperanto pri la ekspozicio "Modo kaj stilo en fotoarto-2017". Ĉeestis sume ĉ. 15 moskvaj esperantistoj.

9. La 27-an de majo 2017 Alisa Zingerman organizis por masianoj la unuan provon pri debatoj en Esperanto.

Amasaj aranĝoj por ekstera publiko

1. Moskvaj Lingvaj Festivaloj №10 (20.12.2015) kaj №11 (20.11.2016). En organizado de MLF-11 grave kontribuis Sofja Zareckaja, inter organizantoj – Maksim Silantjev, Aleksandr Lebedev, Maksim Ĵitĉenko, Jekaterina Lozina, Aleksandr Basov, Alisa Zingerman, Tatjana Glaznica, Ludmila Vasiljeva kaj multaj ekzaj masianoj aŭ finintoj de MASI-kursoj.

2. Du festivaloj de parolaj kluboj en la kinejo "Kosmo" (23-14.04.2016 kaj 25.10.2016). Multe helpis Maksim Silantjev, Mikaelo Abramoviĉ, Natalja Laziĉ, Pjotr Fedosov, Dmitrij Bogatov, Tatjana Fjodorova, Olga Ŝabat.

3. Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof, kinejo "Kosmo" (18.12. 2016). En organizado grave kontribuis Sofja Zareckaja kaj Maksim Silantjev.

Internacia agado

1. Masianino Arina Osipova estas Ĝenerala sekretario de TEJO kaj respondeca estrarano pri IJKoj.

2. Ekde majo 2016 ĝis julio 2017 masiano Ilja Gnusarjov laboras kiel volontulo en Internacia E-Centro de E@I en Slovakio, interĉetere kiel organizanto de plej diversaj internaciaj E-aranĝoj.

3. Ekde 10.07.2017 al la Internacia E-Centro de E@I en Slovakio forveturis por volontula laboro dum unu jaro la masianinoj Sofja Zareckaja kaj Jekaterina Lozina.

4. Aleksandr Lebedev partoprenis tradukadon de TEJO-paĝaro.

5. En marto 2017 startis nova internacia projekto "Esperanto-Poŝtkruciĝo" (vd malsupre).

6. En aprilo 2017 Irina Gonĉarova prelegis pri la nuntempa E-movado en Rusio antaŭ partoprenantoj de la 10-a Mezorienta Esperanta Kunveno en Kartvelio.

Projektoj

1. Ekde septembro-2015 regule funkciaj jutub-videoj "Esperanto: la unua kanalo", grandparte – intervjuoj kun esperantistoj en Esperanto. Al julio-2017 aperis 70 filmetoj, la kanalon abonas ĉirkaŭ 900 homoj. Idea gvidado – Irina Gonĉarova, teknika plenumado – Aleksandr Basov kun helpo de Aleksej Panov kaj kelkaj aliaj masianoj kaj nemasianoj.

2. Ekde marto-2017 funkcias internacia projekto "Esperanto-Poŝtkruciĝo", kiun jam partoprenas pli ol 115 homoj el 25 landoj, vigle vivas konvena grupo en la VizaĝLibro. Ideo: Julija Samsonova, gvidado – Irina Gonĉarova, teknika plenumado – Jurij Smirnov.

3.: "Lingvoj kaj Libroj" - internacia kolekto por ekspozicioj de diverslingvaj libroj. En stato de ellaborado.

4. "Ni voĉlegu!" – grupo en VKontakte por deklamado de Esperanta poezio kaj prozo. Iom dormanta projekto pro konkurado kun "Esperanto: la unua kanalo", kiu parte kovras ankaŭ deklamadon.

Publikigaĵoj

1. En ĉiu numero de La Ondo de Esperanto (kun raraj esceptoj) aperas artikolo de Irina Gonĉarova pri MASI-agado.

2. En ĉiu numero de REGO (kun raraj esceptoj) aperas artikolo de Irina Gonĉarova pri MASI-agado.

3. Tre akurate estas gvidata la grupo en VKontakte pri MASI-agado kaj fotokroniko.

4. Ekzistas regule renovigata interretpaĝaro de MEA MASI. Gvidas Natalja Ĉistozvonova. Nun estas preparata nova paĝaro far' de Jurij Smirnov.

5. Ekzistas paĝaro de MEA MASI en VizaĝLibro. Gvidas Sergej Kuznecov.

6. Artikoletojn pri Esperanta Poŝtkruciĝo estas dissendataj al plej diversaj E-eldonaĵoj tra la mondo far' de Jurij Smirnov.

7. Sporade aperas publikaĵoj de Irina Gonĉarova en aliaj E-eldonaĵoj.

Bonfara agado

1. Ĉiun kvaronjaron MEA MASI sendadas fincan subtenon al la Vortaro de Kondratjev.

2. APERon partoprenas 1-2 nepagipovaj esperantistoj senpage, partopage aŭ repagante la partoprenon dum la jaro.

Impresoj pri RET-2017



Antaŭ kelkaj tagoj nia kvinkapa urala esperantista grupeto revenis hejmen post la vojaĝo al Jaroslavla provinco kaj partopreno tie, en Poŝehonjo, la Rusiajn Esperanto-Tagojn-2017. Dum pluraj monatoj de la jaro ni atendis RET-on kaj revis pri ĝi kaj jen nun niaj revoj transformiĝis jam en la rememorojn. Sed por mi estas plezuro eĉ nur rememori tiun ĉi tempon.

Ĉiu vojaĝo similas al nova, ankoraŭ ne tralegita libro. Komence vi scias nur ĝian titolon kaj aŭtoron, sed poste ĉiu

tago de la vojaĝo iĝas realaĵo kaj similas al la nova ĉapitro de la libro. Same kiel libroĉapitroj, la tagoj estas diversaj: longaj kaj pli kurtaj, eventoplenaj kaj ne tre, kaj foje tiom atentokaptaj, ke vi ne volas, ke la tago finiĝu, same kiel oni ne volas, ke finiĝu la libroĉapitro kaj oni volas daurigi la legadon.

Komenco de la vojaĝo kaj la unua tago de RET 2017.

La vojaĝo komenciĝis tre agrable, kiam nia kvaropo (Pavel Veselov el Tjumeno, Vladimir Opletajev el Surguto, Lena Uspenskaja kaj mi el Jekaterinburgo) renkontiĝis en la trajnvagono, kie nin rapide forlasis la grizeco de la rutina vivo kaj cedis lokon al ĝoja amika kunestado, senĉesaj interparoloj pri diverso, kun teŭmado kaj antaŭĝuo de la evento. Ni ne rimarkis, kiel rapide pasis la vojo-tempo, kaj ni jam atingis la turisman bazejon “Strangula korto”, kie devis okazi RET-2017.

Beleco de la loko kaj naturo estis memvalora, ĝi kaptis nin de la unuaj tagoj kaj ne forlasis ĝis la fino. La tuta pejzaĝo estis paca, milda, ĝi donacis animan kvieton kaj percepton de la harmonio. La mondo, plena de freŝa aero, lumo kaj akvomoviĝo! Eblis ekhalti kaj silente observi la sunleviĝon aŭ la mirindan sunsubiron! En la korto staris granda kelketaĝa ligna domo, kiu servis kiel hotelo por loĝado en komfortaj kondiĉoj, pluraj unuetaĝaj lignaj dometoj, manĝejo kaj kelkaj laŭboj. La tuta korto estis riĉe ornamita per multaj lignaj skulptaĵoj, (de herooj de tre konataj fabeloj kaj fabeloj) kiuj gardis la trankvilecon de la korto kaj kiujn ĉiam estis agrable tuŝi kaj karesi dum la promenadoj. Sufiĉis nur transiri la korton por veni al la bordo de la akvorezervejo, en kiu multaj el ni naĝis matene kaj en alia libera tempo de la tagoj. La aero, verdaĵoj, aromoj, akvujo vekis admiron, oni volis kanti kaj en la memoro aperis poeziaj linioj. Mi kelkfoje citis al la geamikoj tre konvenan strofon el la poemo de M. Giŝpling:

“La milda sun’, kaj la karesa vento
Kaj la profunda, diafana blu’...
Ho, kia bel’ ! Ne pasu la momento –
Ĝi daŭru plu,
Ĝi ĉiam daŭru plu!”

La bunta mozaiko de la programo de tiuj ĉi tagoj estis kunmetita el diversaj programeroj. Post la sinprezento de la partoprenintoj, interkonatiĝo kaj apartaj anoncoj de la respondeculoj pri la programeroj, en la unua vespero okazis la koncerto de nia ŝatata bardo Mikaelo Bronŝtejn, kiu povis viziti la renkontiĝon nur por du tagoj, ĉar li devis forveturi eksterlanden por partopreni internacian Esperanto – aranĝon. Ni ĝuis novajn kaj multajn malnovajn kantojn en la plenumo de Mikaelo, ofte kunkantis, kaj agrabla, amika etoso de la vespero bonege unuigis ĉiujn

ĉeestintojn. Fine de la vespero estis komuna festado de la 25-jara jubileo de la eldonejo “Impeto”, kiam sonis voĉigitaj rememoroj pri la krea vojo de ĝiaj eldonistoj, amikaj tostoj kaj estis aranĝita vendeokspozicio de libroj de “Impeto”. Dum la lasta mi akiris kelkajn novajn Esperanto-librojn por mia biblioteko, la novan diskon de Mikaelo Bronŝtejn en la kunlaboro kun Sergeo Straŝnenko kaj donace ricevis la antaŭnelonge eldonitan romanon de Mikaelo Bronŝtejn “Mi stelojn jungis al revado” kaj tuj povis peti la aŭtografon de la aŭtoro.

Legado omaĝe al la 140-jara jubileo de I. Ŝirjaev



Dum la dua tago de RET tage mi vizitis unu el prelegoj de la Somera universitato. Ĉiuj prelegoj estis vere interesaj, sed mi mem povis ĉeesti entute nur kvar (tial pli bone iu alia prilumu tiun programeron) Krome mi partoprenis KoRo-n (Konversacian rondon), kiun gvidis Irina Gonĉarova, ĉar mi scivolis pri formoj kaj iloj, kiujn ŝi uzas por paroligi esperantistojn – novulojn. Sed plej multe impresis min en tiu tago la aranĝo, kiu nomiĝis “Legado omaĝe al la 140-jara jubileo de Ivan Ŝirjaev”. Dum ĝi okazis

prelego pri Ivan Ŝirjaev fare de pastro-monaĥo Taŭriono (Ilija Smikov) el Moskva eklezia seminario. Ŝirjaev estis elstara esperantisto de la 20-30 jaroj de la pasinta jarcento, verkisto kaj tradukisto (kiu tradukis en Esperanton verkojn de F. M. Dostojevskij kaj L.N. Tolstoj), iniciatinto kaj ĉefredaktoro de la Enciklopedio de Esperanto. Multaj verkoj de la verkisto estis publikigitaj dum lia vivo en diversaj Esperanto-revuoj kaj kelkaj ricevis literaturajn premiojn, sed manuskripto de la ĉefa verko de I. Ŝirjaev - romano "Sen titolo" longe kuŝis en Esperanto-muzeo de Vieno kaj estis publikigita nur en 1995. La pastro Ioanno naskiĝis en Poŝehonjo, en la vilaĝo Vereteja kaj de 1905 diservis en la preĝejo de Zinovjevo. Li konatiĝis kun Esperanto en 1895, dum sia studado en Jaroslavla eklezia seminario kaj dum la tuta vivo restis la fidela adepto de la lingvo.

Dum la aranĝo ruslingve prelegis ankaŭ regionesploristo Galina Burŝa el la vilaĝo Vereteja, kiu rakontis pri la naskiĝloko de I. Ŝirjaev. Krome Maksim Soloĥin prezentis la biografion de la pastro kaj Nikolaj Gudskov voĉlegis la publikigitan studaĵon de Sten Johansson pri la verkaro de I. Ŝirjaev.

Mi devas diri , ke min tre impresis la personeco de Ivan Ŝirjaev, historio de lia vivo kaj krome mi rememoris, ke dum la eldonado de “Komencanto”, en ĝia rubriko pri la historio de la Esperanta literaturo, ni publikigis la materialon pri Esperanto-verkisto-klasikulo Ivan Ŝirjaev kaj prezentis fragmenton el unu el liaj verkoj. Ĉu mi povus imagi tiam, ke pasos dekoj da jaroj, kaj mi vizitos lokojn, ligitajn kun li kaj eĉ ĉeestos la liturgion, dediĉitan al li! Jen per kio estas valora RET-2017!

Vespere de tiu tago okazis ankoraŭ unu bona koncerto de la aŭtoro kanto de moskvano Mikaelo Povorin, sonis liaj jam konataj por mi kaj ankaŭ multaj aŭdindaj novaj kantoj. Tiel agrable finiĝis la dua tago de RET.

Partopreno en liturgio honore al la pastro I. Ŝirjaev kaj vojaĝo al Kukoboj.

Frumatene de la tria tago startis nia vojaĝo al la vilaĝo Zinovjevo, kie ĉiuj dezirantoj povis partopreni liturgion honore al la pastro I. Ŝirjaev, kiun iniciatis pastro-monaĥo Taŭriono (I.Smikov). La liturgion gvidis episkopo Ribinska kaj Danilova – Veniamino, kaj ĝi okazis en la

duonruiniĝinta Asumpcia preĝejo de la vilaĝo Zinovjevo, kie la pastro Ioanno diservis ekde 1905 kaj ĝis la morto en 1933.

Atingi tiun lokon estis aparta aventura historio. La buso, per kiu ni vojaĝis al la vilaĝo, haltis ĉerande de la landvojo, plu ni povis veturi ĝis la preĝejo nur per la traktoro, ĉar neniu alia

veturilo povis traveturi tiun malglatan seskilometran vojon kun profundaj kavaĵoj, plenaj je koto post la nokta pluvego. Krome neniu el la organizantoj atendis tiun intereson al la liturgio flanke de esperantistoj, kaj oni antaŭvidis ne pli ol 10-12 dezirantojn, kiuj povus libere dislokiĝi en unu traktora remorko. Sed kiam venis la buso kun pli ol 40 esperantistoj, evidentiĝis bezono de almenaŭ ankoraŭ unu traktoro. Feliĉe, ankaŭ la dua traktoro estis



disponigita sufiĉe rapide, kaj ni ĉiuj ekveturis al la preĝejo. Estis vera ekstremaĵo veturi en la traktoraj postveturiloj, kun la terura skvado kaj saltado dum la vojo. Bela kaj suka koto flugis el sub la traktoraj radoj kaj kuŝiĝis sur la vestojn, la suno senavare brilis desupre... Atinginte la lokon, ni kun granda intereso ĉeestis la liturgion. Apud la preĝejo ni ekvidis lignofajron, kiun prizorgis vilaĝanoj kaj kiuj boligis tie la akvon por teo kun kukoj, per kiuj oni regalis nin ĉiujn tuj post la fino de la liturgio, kaj tio ankaŭ estis tre kortuŝa. La sama romantika vojaĝo ripetiĝis reen ĝis la atendanta nin buso, kaj baldaŭ ni jam veturis plu, direkte al la vilaĝo Kukoboj, gastis ĉe avinaĉjo Jaga.

Jen detaloj ankaŭ de tiu momento, kiu revenigis nin en la infanecon kaj en la mondon de fabeloj. En bela vilaĝa korto kaj sojle de la fabela domo nin akceptis du rusaj belulinoj en popolaj kostumoj kaj invitis ĉiujn enen, kie en ĉambro jam atendis gastojn pretaj tabloj kun la varmegaj samovaroj, kukoj kaj dolĉaĵoj. Ni trinkis teon, gustumis la regalaĵojn de Jaga kaj partoprenis la komenciĝintan amuzan spektaklon, iom poste gaja koboldo gvidis nin al la arbaro de la avinaĉjo, meze de kiu staris ŝia arbara dometo. Baldaŭ montriĝis mem Jaga, kiu vigle komuniĝis kun ni ĉiuj, nomis iujn belulino, princo kaj princino, unuvorte amuzis nin kaj ridigis. Ni kiel infanoj kuradis – flugadis sur la balailo, turniĝis kune kun la avinaĉjo sur la ŝtupoj de la dometo, certe fotiĝis kaj sentis nin absolute feliĉaj. En la buso, dum la rea vojo al nia bazejo, mi pensis pri tio, ke homoj ne perdis intereson al fabeloj, ĉar ili ebligas deflankiĝi de realaĵoj, forgesi pri zorgoj kaj afliktoj.

Do, ankaŭ la tria tago disponigis al ni tiom riĉan palettron de eblecoj kaj tiom da ankoraŭ nevidita kaj nespartita. Kaj kronis la tagon bela, romantika poezia vespero, kiun scipovas lerte organizi Irina Gonĉarova. Ĉe la ronda tablo kun la kandeloj sidis pluraj poeziŝatantoj kaj deklamis en Esperanto siajn plaĉajn poemojn de diversaj aŭtoroj.

Ekskurso tra Poŝehonje. Mirinda vespera koncerto de “Ekvinokso”

En la kvara tago de RET, tuj post la matenmanĝo, ekis piedpaŝa marŝo al Poŝehonjo kaj duontaga ekskurso tra la urbo. La urbeto situas ne tiom fore de la bazejo “Strangula korto”, la vojo ne estis enua kaj nia multopa grupo promenis tre volonte.

Anchoraŭ vintre, kiam mi eksciis, ke RET-2017 okazos en Poŝehonjo, mi certe rememoris la titolon de la verko de Saltikov – Ŝĉedrin “ Poŝehonskaja starina” (“Poŝehonja antikveco”), kaj en mia imagoj aperis neurbaj pejzaĝoj, unuetaĝaj domoj sur ne tre vastaj stratoj, vilaĝa preĝejo, lageto, nehasta bona vivo...



Reale Poŝehonjo estis malnova, trankvila, sufiĉe pura kaj taŭga por la vivo negranda urbeto, nur kun 6 miloj da loĝantoj. Antaŭe la loko sur la rivero Ŝeksno (la malnova nomo Ŝehonj) nomiĝis Poŝehonje kaj apartenis al Jaroslavl princlando ĝis la jaro 1341. En la 17-a jarcento surloke de la nuna urbo troviĝis la vilaĝo Pertomka (pro la samnoma rivero Pertomka). En 1777 Katerina la Granda per sia ukazo alinomis la vilaĝon en la urbon Poŝehonjo. Nun oni nomas ĝin la “urbo de kvin riveroj kaj sep pontoj” kaj ŝercas, ke tiun kvanton por ĉiu kapo havas nek Venecio, nek Peterburgo aŭ Hamburgo. La nuna Poŝehonjo havas du templojn: la Triunan katedralon sur la urba placo kaj la Aŝumpcian preĝejon ĉe la tombejo. Mem la urba placo de Libero havas duonrondan formon, kiu per la formo de la “malfaldita ventumilo” de stratoj determinas la tutan urboplanon. Sur la placo estas komercaj vicoj, tiom karakteraj por la mezrusiaj provincoj. Malantaŭ la katedralo estas negranda parko kun la memorejo de herooj. Ni iris al la blankŝtona preĝejo de la katedralo, kun la smeraldkoloraj kupoloj kaj sonorilejo. Ĉiuj dezirantoj eĉ povis ascendi ĝin kaj provi kariljoni desupre. Poste ni iom promenis tra la urbocentro, observante festan etoson, kiu regis tie (la urbo festis sian 240 –jarigon). Ni ankaŭ vizitis regionografian muzeon, kie ĉiĉeronino rakontis al ni pri la historio de la urbeto kaj ĝiaj metioj, kie ni ankaŭ eksciis pri la aŭtoro de la fama recepto de poŝehonja fromaĝo G. A. Kamenskaja. Post la muzeo ekskurso daŭris jam sur la urbaj stratoj. Tiumomente mi kun du amikoj decidis reveni al la bazejo, ĉar ni sukcesis viziti kaj iom vidi la urbon en la antaŭa tago. Ni jam vigle paŝis laŭ la ponto trans la riveron Pertomka, kiam komenciĝis ŝtormo kaj pluvego, de kiu nin ne povis savi eĉ niaj ombreloj kaj anorakoj. La lastan distancon ĝis la “Strangula korto” ni vete kuregis sed revenis al la bazejo plene malsekaj. Nature, post la duonhoru tiu somera pluvego finiĝis kaj denove ekbrilis la suno. Ŝanĝinte la vestojn kaj trinkante varmegan teon, ni jam kun ridetoj plezure rememoris nian mallongan aventuron.

Vespere de tiu tago okazis koncerto de la muzikgrupo “Ekvinokso” en la konsisto: Andrej Obrezkov kaj Valerij Vorobjov el Ivanovo kaj Evelina Sokolova el Krasnojarsko. Tio estis vere impresa kanta-muzika mirteatraĵo, kiu ricevis meritan atenton de la publiko. Muzikistoj kaj kantistoj de la grupo, ĉiu kun sia fascino, talento kaj temperamento, tre harmonie kaj amikeme kunekzistis sur la scenejo kiel unueca kolektiva organizmo, donacante al la aŭskultanta publiko tiom da pozitivaj emocioj. Muziko kapablas efiki iujn animsensilojn kaj krei tute apartan, neforgeseblan humoron! Post tiu ĉi koncerto multaj sentis emocian entuziasmon kaj estis forte impresitaj.

REU–konferenco. Lignofajro. Aŭtora vespero de Ludmila Novikova.

Dum la sekvaj du tagoj de RET, la kvina kaj sesa, ĝis la tagmezo daŭris la planita Konferenco de REU. Ĝi pasis sufiĉe paceme, sen iuj komplikaj, kun la kutima tradicia tagordo. Estis raportoj de REU –prezidanto, de apartaj estraranoj kaj ankaŭ de klubgvidantoj aŭ klubaj reprezentantoj. Ĉar mi konstante interesiĝas pri la stato de la Esperanto – movado en Rusio kaj kaptas ĉiujn novaĵojn pri ĝi, ne estis io nova kaj neatendita por mi. Dum la reelektoj, estis du

kandidatoj por la posteno de REU - prezidanto (Svetlana Smetanina kaj Mikaelo Ĉertilov) kaj estis denove reelektita kiel prezidanto Svetlana. Freŝecon al la momento aldonis elekto en la Estraron de nia uralano Vladimir Opletajev, kiu elektigis la unuan fojon, ĉiuj ceteraj estraranoj jam ne estis novuloj tie. Kompreneble, min ĝojigas tiu fakto, ke Vladimir iĝis REU-estrarano, kaj mi deziras al li sukcesan kaj fruktodonan laboron en la kampo de instruado en REU. Krome dezirindus, ke ni samregionanoj, subtenu nian amikon kaj kiom eble helpu al li!

Vespere de tiuj du tagoj okazis bonegaj kaj memorindaj programeroj. Unu el ili estis lignofajro ĉe borde de la akvorezervejo. Mi ŝatus danki la prizorgantojn de la lignofajro, kiuj donacis al ni tiun nostalgiplenan vesperon! Iam lignofajroj estis konstanta elemento de SEJT-oj. Mi ĝis nun memoras la lignofajrojn, kiuj ĉiuvespere okazis dum OkSEJT en Jurmala ĉe borde de Balta maro! Ankaŭ ĉi-foje ni plezure sidis “en amika rond”, kunkantis komunajn kantojn akompane de la gitaro de Mikaelo Povorin kaj de la akordeono de Vladimir Solovjev. La fajro brulis jen pli forte, jen malpli, ankaŭ niaj voĉoj sonis pli laŭte aŭ ne tre. Ni ankaŭ ĝue observis la belan sunsubiron, la ŝanĝon de ĉielkoloroj kaj luman vojeton sur la akva surfaco. Laŭronde ni gustumis la regalaĵon el Kubo – bonodoran kaj fortan rumon, kiun alportis gasto de RET, kuba esperantistino Alina Dolores Zuaznabal Himely. Estis vere romantike, tre animece kaj varmece en ĉiuj sencoj! Tiunokte longe maleblis endormiĝi, ja en la kapo plu sonis la rememoritaj kantoj:)



“Aparta kanto” estis la sekvontaga programero – aŭtora vespero de nia poetino Ludmila Novikova, eksa uralanino, kiu nun loĝas en Moskvo. Ludmila mem voĉlegis la proprajn tradukojn de rusiaj klasikuloj, siajn originalaĵojn kaj ankaŭ kolektis la geamikojn, kiuj tre emocie kaj bele prezentis ŝiajn poemtradukojn. Inter la deklamantoj tiuepere estis du uralanoj: V. Opletajev, voĉleginta la tradukitan de Ludmila poemon de A. Blok “Rusio” kaj mi, prezentinta la poemon de A. S. Puŝkin “Al Baĥĉisaraja fontano”. Tio estis belega eblo mergiĝi en la kreaĵon de Ludmila! Ankaŭ muziko, fratino de poezio, akompanis poeziajn verkojn en tiu ĉi vespero. Komponitaj de Mikaelo Povorin kantoj al la versaĵoj de M. Cvetajeva kaj K. Balmont en la traduko de Ludmila sonis, tre profunde penetrante en la animon. Ankaŭ “Ekvinokso” bele kantis kelkajn tre konatajn kaj malnovajn kantojn je vortoj de Ludmila, inter ili tre plaĉan al mi “Orienton”. Por mi, poeziŝatanto, ankaŭ tiu ĉi vespero iĝis vere neforgesibla!

Raja Kudrjavceva

Prelegaro de RET-2017

La programo de la Rusiaj Esperanto-Tagoj-2017 ofertis multon klerigan, kio konsistigis la abundan prelegeron de la Somera universitato, dokte gvidata de Nikolaj Gudskov, kaj plurajn diskutrotonojn. Ne ĉiuj prelegoj estis ligitaj kun Esperanto, sed ĉiuj temoj senescepte estis interesaj, provokis multajn demandojn de la aŭskultantoj kaj diskutojn.

Mi klopodis ĉeesti ĉiujn prelegojn, sed bedaŭrinde pro la samtempe okazigataj programeroj miaj penoj ne tute realiĝis, kaj en ĉi tiu mesaĝo mi mencias nur prelegojn, kiujn mi aŭskultis. Tiu ĉi preleglisto ne respegulas do la tutan temaron.

Mikaelo Bronŝtejn – “Tihvino kaj ĝiaj sanktejoj”. Mikaelo estas sperta oratoro, li prezentis tre interesan historion de la Sankta Tihvina ikono de Dipatrino.

Mikaelo Bronŝtejn – “Sonato pri entreprenado”. Li rakontis pri faktoj pri la uzado de Esperanto en la entreprenado: komerco, turismo, komerca varbado ktp., kaj pri propraj spertoj kaj provoj starigi komercajn ligojn per Esperanto.



Nikolaj Gudskov – “Zamenhof kiel reprezentanto de la “rusa kosmismo”. Filozofiaj aspektoj de la idearo de L. Zamenhof kiel parto de la “rusa kosmismo”.

Pastro Taŭriono (Ilija Smikov) – “Ivan Ŝirjaev. Vivo kaj verkaro”. Detala raporto pri la vivo, pastra servado kaj Esperanta verkaro de la ortodoksa pastro Ivan Ŝirjaev enkadre de la “Lego-tago omaĝe al la 140-jara jubileo de I. Ŝirjaev”.

Aleksandr Osokin – “Pri la vortaroj de Boris Kondratjev”.

Anna Striganova - “Lingvo de fabeloj, aŭ samaj motivoj en fabeloj de diversaj landoj”.

Anna Striganova – „Baba Jaga el la scienca vidpunkto“.

Anna Striganova – “Dronintaj urboj: realaj kaj fabelaj”. Anna profunde studas folkloran temaron de fabeloj kaj mem verkas fabelojn en Esperanto.

Gennadij Basov – „Lidija Zamenhof – vivo kaj agado; ŝiaj samideanoj“. Rakonto pri la vivo de la filino de L. Zamenhof, ŝia poresperanta agado kaj aktivado en la religia movado de bahaistoj, ŝia tragika pereco en la faŝista koncentrejo.

Dmitrij Ŝevĉenko – “Elektronikaj libroj en Esperanto”.

Dmitrij Ŝevĉenko – “Distancaj kaj korespondaj kursoj de Esperanto”. Ambaŭ prelegoj de la redaktoro de la revuo “Esperanto” argumentite prezentas tre interesajn spertojn, aktualajn faktojn kaj analizojn.

Vladimir Opletajev – “Lingvoprotektado en Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto – Ugrujo”. Problemoj kaj devioj en la protektado de la minoritaj ĥanta kaj mansa lingvoj en la aŭtonoma distrikto.

Vladimir Opletajev

La turisma programo de RET

La turisma programo de RET-2017 kaj la postREta vojaĝo sendube plaĉis al ĉiuj partoprenintoj, ĉar ni trafis la lokojn kaj urbojn, kiuj estis grava historia scenejo en la mezepoka Rusio kaj kiuj nun apartenas al la urboj de la Ora ringo.

Poŝehonjo (1777), kiu gastigis RETon en la fabela bazejo “Strangula korto”, estas ĉarma rusa provinca urbeto, situanta surborde de Ribinska akvorezervejo kaj vivanta sian nehastan trankvilan vivon en novaj kaj malnovaj domoj, inter la Lenin-monumento kaj la ĉefpreĝejo de Triunuo.

La 8an de aŭgusto multaj RETanoj partoprenis la tutagan ekskursan vojaĝon al la urboj Ribinsko kaj Tutajevo (Romanov-Borisoglebsk).

Ribinsko estas la dua granda urbo de Jaroslavla provinco, ĝia grava komerca kaj industria centro. En la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento ĉi tie estis konstruita hidroelektrocentraro kaj kreita vasta akvorezervejo. Dum la ekskurso ni povis ĝui la belan historian centron de la urbo kun la Savanto-Transfiguriĝa katedralo, promenis sur la kajo de Volgo, vizitis la muzeon de la subakvigita urbo Mologa.

Transveturinte Volgon per pramŝipo, ni atingis la urbeton Tutajevo (1777). La urbo ricevis sian revoluciulan nomon en 1918, sed antaŭe tio estis du memstaraj malnovaj urbetoj Romanov kaj Borisoglebsk. Tutajevo estas la 12a urbo, apartenanta al la Ora ringo (entute 12 urboj), posedas plurajn preĝejojn, inter kiuj elstaras Kazana preĝejo kaj Resurekta katedralo, sed ĝi bezonas urĝan restaŭradon de siaj historiaĵoj.



La 4an de aŭgusto post la Sankta liturgio en la vilaĝo Zinovjevo, kie diservis pastro Ivan Ŝirjaev, okazis vizito al la vilaĝo kun la kurioza nomo Kukobojo, en kiu nin ĉiujn surprizis per sia beleco la Savanta preĝejo, kaj la vilaĝanoj amuzis nin per folkloro spektaklo, en kiu ĉefrolis Baba Jaga.

La 9an de aŭgusto granda grupo de ekskursemaj RET-partoprenintoj venis en la vilaĝon Vjatskoje (1502) apud Jaroslavlo, promenis tra ĝiaj flegitaj stratoj, vizitis muzeojn, noktumis en luksa hotelo. Vjatskoje estas aligita al la Asocio de la plej belaj vilaĝoj de Rusio ekde 2015.

La tutan tagon de la 10a de aŭgusto ni pasigis en la bela malnovrusa urbo Jaroslavlo (1071), vidis multajn neforgeseblajn vidindaĵojn kaj ĝuis aŭtentan mezepokan atmosferon de la antikva urbo. La tutagan piedekskurson lerte ĉiĉeronis en Esperanto jaroslavla esperantisto Georgo Kontrov.

Fine ni atingis nian lastan vojaĝcelon – la urbon Kostromao (1152), kiu mirigis ĉiujn per sia belega malnova centro, multaj monumentoj, parkoj, majestaj konstruaĵoj, ĝi posedas ja oficiale la titolon de “historia urbo”. Kostromao estas la hejmurbo de Neĝulino.

Vizitinte kelkajn malnovajn rusajn urbojn, situatajn sur la bordoj de Volgo, ni tuŝis la neripeteblan kulturen tavolon de la naciaj kulturo kaj historio, kies unikeco konserviĝis en ĉi tiu nord-okcidenta regiono de Rusio. Ankaŭ vi vizitu ĝin nepre!

Vladimir Opletajev

Aranĝoj



Paralela Universo en Moskvo mojosas

La 19-an aŭgusto okazis mirinda renkontiĝo, kadre de la internacia Paralela Universo. Ĝi nomiĝis “30/60”, omaĝe al la jubileoj de Anna Striganova kaj Valentin Melnikov.

Tio eĉ ne estis MER, sed malgraŭ la aŭgusta “dormanta sezono” partoprenis 19 esperantistoj el 4 landoj (Rusio, Bjelorusio, Peruo kaj Brazilo). Ni memorigas, ke tiaspecaj renkontiĝoj okazas nur en Esperantujo!

La renkontiĝo neatendite por ĉiuj iĝis unu el la plej etosaj kaj mojosaj, kiuj okazis en nia hejmo. Poezia tago-vespero konsistis el poeziaj deklamoj de Valentin Melnikov, Ludmila Novikova kaj Klara Ilutoviĉ (mem!).

Krom la realaj partoprenantoj estis ankaŭ la virtualaj. Dum la aranĝo estis organizita “skajpo-ponto” kun Kopenhago, kie samtempe okazis aranĝo de Paralela Universo. La aranĝon skajpe ankaŭ partoprenis Mikaelo Bronŝtejn, kiu deklamis la poemon.

Estis ŝokige riĉa koncerta progamo. Malgraŭ malĉeesto de la tradiciaj gitaristoj de MER, okazis internacia koncerto, dum kiu Aleksandr Lebedev plenumis kelkajn orajn kantojn; Aleksandr Vikulov plurajn kantojn, inkluzive tiujn de *Kajto*, Kim kaj *Persone*; Sara el Brazilo kaj Miguel el Peruo kantis kelkajn konatajn en Esperantujo kantojn.

Unue en la historio de tiaj aranĝoj okazis “bambado” (dancado de la konata mojosaj kanto) kaj “amika rondo” (jes, jes... tiu “Por Esperanto...” kaj jes, kun la kantado de “Ni renkontiĝos...”).

La “oficiala” programo daŭris 7 horojn kaj kelkajn horojn post la neoficiala parto.

Dima Ŝevĉenko



RA-12 en la Altaĵa montaro

La 1-an – la 11-an de julio 2017 en Respubliko Altaĵo (Rusio) en Altaĵa montaro en Aktru (Geografia Bazejo de Tomska Ŝtata Universitato) sukcese okazis "Renkontiĝo de Amikoj – 12"



(RA-12). Partoprenis grupo el 18 personoj: 6 viroj kaj 12 virinoj el diversaj partoj de la lando.

Ni loĝis je 2050 metroj super la marnivelo. Ĉiutage okazis turistaj marŝadoj laŭ montoj, grimpadis sur krutajn rokojn. En la dua tago ni grimpis proksimume ĝis 2800 metroj super la marnivelo sur montsupran glaĉeron. En alia tago plejmulto de niaj esperantistoj grimpis ĝis montpasejo Instruisto, kiu situas je 3000 metroj super la marnivelo. Ĉiuvespere post la marŝadoj okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, lingvaj kaj aliaj ludoj, rajdadoj sur ĉevaloj, festenoj ktp.

En junio 2017 en Siberio estis eksterordinare varma vetero. Tial ni ĝuis friskan veteron en Aktru. Se la tutmonda plivarmiĝo daŭros en aliaj jaroj, eblos organizi aliajn "Renkontiĝojn de Amikoj" en Aktru ĉiujare.

Vladimir Minin

Eventoj

Ĉu kuriozaĵo aŭ serozaĵo? – Vladimir Putin menciis Esperanton!

Vladimir Putin – kiel neantaŭanoncita honorgasto – la 20-an de aŭgusto malfermis la ĉi-jaran sesion de la tradicia internacia ĵaz-festivalo "Koktebel Jazz Party" en Koktebel, artista vilaĝo en Krimeo, kie li diris i.a.: "Muziko – ĝi estas lingvo, jen ĝi estas Esperanto, internacia lingvo, kiu unuigas homojn." Vd, ekzemple: <https://ru.sputnik.kg/video/20170821/1034805478/putin-nakoktebel-jazz-party.html>.

Vizito de alilandanoj enkadre de karavanoj al UK

Ĉi julie Moskvon vizitis 2 grupoj de alilandaj esperantistoj, kiuj transite veturis al la 102-a Universala Kongreso en Seulon.

Por la gastoj estis organizita interesa, alloga, riĉenhava programo. En la unua grupo, kiun iniciatis So Gilsu, estis 14 personoj el Koreio, Japanio, Pollando, Nederlando kaj Hispanio. La duan grandegan grupon el 40 personoj (kiun organizis Tatjana Loskutova sub aŭspicio de REU) konsistigis esperantistoj el Germanio, Francio, Svislando, Bulgario, Usono, Belgio.

La gastoj ĝuis profesian ĉiĉeronadon tra belega moskva metroo, vizitis Ruĝan Placon, Kremlon, Kolomenskoje, promenis en Arbato.

Treege interesa kaj neforgesebla estis busekskurso tra la grandega urbo: oni admiris Kliniĝan Monton, Universitaton, antikvajn stratetojn de la urba centro, Novvirgulinan monaĥinejon kaj multon alian.



En unu el vesperoj niaj amikoj plezure spektis la dancensemblon "Kostroma" en la Teatro de rusa kanto. Ŝipumado laŭ la rivero Moskva malgraŭ pluva vetero lasis agrablajn rememorojn. Eta muzeo de rusa vodko neniu lasis indiferenta, oni eksciis interesajn faktojn el historio de vodko en Rusio. Por renkontiĝi kun alilandaj esperantistoj al diversaj rendevulokoj venadis moskvaj esperantistoj, tio manifestaciis, ke Esperanto vivas kaj ne bezonatas interpretistoj. Malmultaj tagoj traflugis rapide, kontentaj gastoj forveturis el Moskvo al Bajkalo, Vladivostoko, Seulo...

Grandan dankon al helpantoj, akompanantoj, kunagantoj en tiom grandioza laboro pri akcepto de alilandanoj!

Svetlana Smetanina

Eventoj surloke

Prelega sesio "Moderna arto: serioze kaj ironie"

Estas tute nova projekto de MEA MASI. *Julia Samsonova (Klera)*, bone konata pro siaj priartaj prelegoj dum APERo kaj pro la du ekskursoj pri la moderna arto, okazigitaj en majo 2017 en "Maneĝ", proponas al ĉiuj interesiĝantoj la prelegan sesion en Esperanto. Fakte estas kurso el 5 prelegoj. Ĉiu prelego konsistis el historia, observa kaj praktika partoj. La kurso estas aŭtora, tutplene ellaborita de Klera speciale por ni. La unua prelego estis enkonduka kaj nomiĝis "Antaŭparolo al moderna arto. Jozef Bojs: projektoj, vivvojo, mitologio." Ĉiujn moskvanojn kaj gastoj de la ĉefurbo nu invitas al la plrelegaro. La anoncoj aperas en la MASI-grupo en VK: https://vk.com/mea_masi



Donaj Esperanto-Ludoj



25-28a de aŭgusto Novoĉerkaska Esperanto-klubo "Novoĉ-EK!" aranĝis E-renkontiĝon "Donaj Esperanto-Ludoj-1" – DELOj-1. Ĝi okazis en la ekzotika loko de Rostova regiono – Etna-argeologia turista centro "La Kaŝita Mondo". Ĝin partoprenis 24 personoj el Novoĉerkasko kaj Volgodonsko kun la aĝo de 2 ĝis 85. La programo ne estis tre serioza, strikta kaj streĉa – la ludoj ja, la rivero ja, ripozo ja, fiŝkaptado finfine kaj la tradicia fiŝa supo. Tamen tio ne signifas ke Esperanto ankaŭ ripozis! Ĝi laboris kaj ĉe tablo, kaj sur la bordo de la trafluejo, kaj dum la fiŝkaptado, kaj dum la ekskurso tra "La kaŝita Mondo". Ne ĉiujn ideojn ni sukcesis efektivigi, tamen ni allogis en Esperantuojn novulojn kaj interesiĝantojn pri Esperanto, konatiĝis kun bela interesa loko kaj praktikis la lingvon pere de interagaj programeroj.

Irina Gorodeckaja

Oni pri ni

Triumfo kaj tragedio. Esperanto kaj Rusia revolucio

La 3-an de aŭgusto en la brita "[European studies blog](http://blogs.bl.uk/european/2017/08/triumph-and-tragedy-esperanto-and-the-russian-revolution.html)" aperis bonega artikolo "Triumph and Tragedy: Esperanto and the Russian Revolution" (<http://blogs.bl.uk/european/2017/08/triumph-and-tragedy-esperanto-and-the-russian-revolution.html>). La aŭtoroj estas Moisej Bronshtejn kaj Renato Corsetti, metis ĝin al la paĝaro Olga Kerzjuk. La artikolo estas ne granda, sed tre bone kompilita kaj riĉe kaj saĝe ilustrita per diversaj kovriloj de libroj pri la koncerna temo. La blogo aperis, kompreneble, okaze de la 100-jariĝo de la Rusa revolucio de la 1917.



“Mia MASI” – nova informfoliaro pri praktika agado

La Konferenco en Poŝehonjo (6-7.08.2017) rekomendas al la kluboj-membroj de REU studi kaj sekvi la spertojn de MEA MASI. Por faciligi plenumon de tiu rekomendo MEA MASI komencas eldonadon de interreta informfoliaro “Mia MASI”. La unua numero aperis la 1-an de septembro. Sur la 16 paĝoj estas prezentitaj iuj el MASI-agadoj, okazintaj aŭguste. Ĉiu raporto havas antaŭparolon, priskribantan la esencan kaj strukturon de la evento. Tiu priskribo prezentas la kopieblan modelon de la agado. La informfoliaron “Mia MASI” eblas legi ĉi tie: <https://drive.google.com/file/d/0B30hvE9q7477NkJBempObGpGeUU/view> aŭ elŝuti ĉi tie: <http://miamasi.weebly.com/>. Utilan legadon!

“Esperanto: La Unua Kanalo” iĝis dujara



Dum ekzisto de la kanalo aperis pli ol 70 videoj, kiuj estis spektitaj 42000 fojojn. Evidentiĝis, ke la kanalo estas la unua en la tutmonda Esperantujo, kiu akcentas sian atenton al intervjuoj kun esperantistoj. Tamen jam ekzistas temaj videoj: sciencaj prelegoj, deklamado de poezio, famaj kantistoj, librojen Esperanto ktp – kaj ni intencas tion daŭrigi. Ĉefa motoro kaj teknika prizorganto de la kanalo estas **Aleksandr Basov (Karter)**. Laŭ li, nia kanalo tre utilas por komencantoj, kiuj povas praktiki komprenon de Esperanta parolado. Abonu nian kanalon! Restu kun ni!

<https://www.youtube.com/channel/UCmXNo743zPZTgb1xmHFiUDA>

Informoj

Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburgo

Informletero 1

La unua lingvotrejnado en Jekaterinburgo okazis novembre de 2014, la dua - januare de 2016, kaj ambaŭ lingvostudadoj iĝis sukcesaj instruaj kaj edukaj aranĝoj tre bezonataj de diversnivele parolantaj esperantistoj en ilia strebo pliperfektigi proprajn lingvokononjn – kaj kapablojn. Jes ja, venis jam tempo daŭrigi ĉi tiun sperton kaj organizi por ĉiuj dezirantaj esperantistoj la trian lingvotrejnadon en Jekaterinburgo!

Organiza grupo

1. Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) – Ĉefa kunordiganto kaj gvidanto de la programo.
2. Vladimir Opletajev (Surguto) – Estraro de REU, prizorganto de la instru-metodika programo por la niveloj A kaj B.
3. Pavel Veselov (Tjumen) – komputila servo, interreto, pretigo de nomŝildoj, certigiloj.

Dato, kondiĉoj

La aŭtuna lingvotrejnado okazos dum la festaj tagoj la 4an – 6an de novembro 2017. Nun estas traktataj organizaj demandoj kun la administracio de la profilaktejo “Uktus” (Jekaterinburgo, strato Prostornaja, 1). Provizora prezo (Diurna loĝado kaj trifoja manĝado por unu persono) estas 1200 - 1500 rubloj. Pli detalaj informoj pri la prezoj aperos komence de oktobro en sekva informletero.

Studprogramo

La programo efektiviĝos en du grupoj konforme al la niveloj A2 – B1,B2. La trejnado havas du kategoriojn de partoprenantoj: instruistojn kaj kursanojn. Kategorio de sporadaj vizitantoj, gastoj kaj observantoj mankas. La lingvotrejnado gvidos esperantistojn, posedantajn instruajn spertojn en la regiona, landa kaj internacia skaloj. Instruisto estas persono, kiu pretas prepari kaj gvidi instruon aŭ kulturklerigan programon minimume por tri instruhoroj (60 min). Instruontoj estas petataj sin anonci kaj kontakti nun la Organizan grupon kaj prezenti siajn ofertojn.

La trejnado celas aktivigi lingvokononjn de ĉiuj dezirataj esperantistoj, evoluigi iliajn bazajn lingvokapablojn: aŭdan komprenon, parolkapablojn, skribokapablojn, legokomprenon, trakti fonajn kulturajn kaj movadajn temojn per lingvaj ludoj kaj konkursoj, vesperaj programoj,



metiejoj, prelegoj ktp. Estas antaŭvidata aparta grupo por infanoj, kie en luda kaj vigla formo oni praktikos Esperanton.

Al la lingva studado estas invitataj diversaĝaj komencintaj esperantistoj, kursfinintoj, memlernintoj, Esperanto-lernantoj, dezirantaj plibonigi siajn lingvokonojn kaj evoluigi la parolkapablojn Ĉiuj kursanoj ricevos certigilon de la Organiza teamo pri partopreno en la lingvotrejnado. Aliĝkoto por kursanoj – 1000 rubloj, por membroj de REU – 700 rubloj, por studentoj kaj pensiuloj – 500 rubloj, por infanoj -senpage. Estas planate okazigi entute dek tri 45-60-minutajn lecionojn. Partoprenontoj de la studado devos plenumi antaŭkursajn taskojn, se tion petos konkreta instruisto.

Aliĝo

Antaŭaliĝoj estas akceptataj de la membroj de la Organiza grupo. Bonvolu plenigi la aliĝilon kaj sendi ĝin al Raja Kudrjavceva: komencanto.r66@ya.ru Pri la aliĝpagado estos aparta informo.

Aliĝilo

1. Persona nomo, patronomo, familia nomo
2. Naskiĝdato: tago, monato, jaro
3. Jaro de esperantistiĝo
4. Poŝta adreso (nepre kun poŝtkodo, ruslingve)
5. Retadreso
6. Via lingva nivelo (Bonvolu taksu ĝin mem, se vi ne jam trapasis la KER-ekzamenon): A1, B1, B2, C
7. Kategorio de via partopreno en la lingvotrejnado: A) kursano; B) instruisto
8. Aliĝkoto: A) laboranto – 1000 rubloj; B) membro de REU – 700 rubloj; C) pensiulo, studento – 500 rubloj; D) infanoj - senpage

La Organiza grupo de LT-3

Esperanto-Poŝtkruciĝo: fortiĝo kaj evoluo

Septembre ekas la 6-a monato de tiu ĉi projekto. Ĝi evoluas ĝojige: jam aliĝis pli ol 130 homoj el pli ol 30 landoj, ekzistas grupo en VK <https://vk.com/bildkarto> kaj tre vigla grupo en Fb <https://www.facebook.com/groups/1421463748076350/>. Plej gravas, ke la interŝanĝo de mansurskribitaj bildkartoj per ordinara poŝto inter la aliĝintaj esperantistoj vere funkcias – kaj vere plezurigas la partoprenantojn. Ni konstante proponas al la membroj novajn taskojn, pro plenumo de kiuj ili ricevas kromajn bildkartojn de la organizantoj. Homoj ofte sendas respondajn bildkartojn, tial dum monato oni povas ricevi ne po unu, sed po kelkaj bildkartoj.

Aliĝu ĉi tie: www.bildkarto.weebly.com

Unu leciono pri Esperanto

La unuan de septembro en Rusio komenciĝos nova lernojar, kaj kutime septembro en la lernejoj estas monato por instrua kaj eduka laborplanadoj, lanĉo de novaj projektoj, aprobo de fakultativaj kursoj ktp. Tiu ĉi lernojara enirperiodo donas ŝancon al lokaj esperantistoj iniciati kaj realigi projektojn, ligitajn kun Esperanto.

Unu el tiuj projektoj aŭspiciataj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estas “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo”. La origina ideo venas de la germana esperantisto el la urbo Hamburgo Klaus Friese (Frize), kiu verkis planon de informaj lecionoj por antaŭlernejoj kaj lernejoj kaj jam praktike sukcese realigas la projekton. Lia broŝuro “Unu lerneja leciono pri Esperanto” estas elŝutebla ĉe

<http://esocom.de/klausfriese/eo-stunde/unuhoro.html>;
<http://www.esperantoland.org/eo/plu.php?msgid=1190>

La celo de la broŝuro estas havigi materialon al lingvoperantoj por fari unu lecionon pri Esperanto, krome ĝi prezentas klarigojn kaj informojn pri Esperanto. La tuta aktivaĵo celas atingi informele kiel eble pli multajn gelernantojn. Sinjoro Frieseviziis en Hamburgo jam pli ol 100 lernejojn kaj tie disdonis la broŝuron persone.

En Rusio informlecionon povas organizi kaj gvidi etataj lerneaj instruistoj, klasgvidantoj dum eduka klaskunveno (klassnij čas), lernantoj por siaj samklasanoj, personoj (gepatroj, studentoj, Esperanto-nstruantoj, klubaj aktivuloj ktp.), kiuj ricevas permeson de lerneja administracio pri tiaspeca agado.

Asociitaj kolektivoj de REU kaj individuaj membroj estas petataj sendi informojn pri okazigitaj lecionoj al la “Bulteno de REU” nikolao@yandex.ru aŭ svsmetanina@yandex.ru

Vladimir Opletajev

Regiona agado en Rusio

Proponu regionan kunordiganton por via loka Esperantujo!

Estimataj samlandanoj!

En la tempo, kiam multaj el ni jam perdas la esperon pri organizita Esperanta Movado en Rusio, mi alvokas vin kunigi nemultajn niajn fortojn kaj, *subtenante unu la alian, en konsento* ekagi por refreŝigi kaj firmigi nialandan Esperantan movadon.

Mi kredas, ke tio eblas. Kaj mi scias, kiel tion fari. Alikaze mi ne konsentus esti elektita en REU-Estraron kaj ne surpronus la taskon respondeci pri la Regiona Agado.

Kompreneble, mi sola en la landa skalo estas nura parolbruo. Sen via helpo, iniciatemo, laboro kaj kunagado okazos nenio. Ne enuiĝu de tiuj vortoj – tion ni jam spertis. Venas nova tempo. Ekdeziru reaktivigi la movadon samkiel tion deziras mi. Ekkredu. Kaj ni ekagu – kune. Poetpaŝe. Nia moto por la komenco estu: *Ĉiu eta ago meritus atenton, ĉiu eta rezulto estas venko!*

Mi komencu de mi. Jen por via atento kaj kritiko la listo de la labordirektoj de la respondeculo pri enlanda regiona agado:

- kompili liston de la regionaj kunordigantoj;
- interkonsenti kun ĉiu kunordiganto pri ties taskoj (kiuj ne nepre koincidos en ĉiuj regionoj)
- kolekti kaj regule aktualigi informojn pri la E-agado en la regionoj,
- serĉi eblojn de la regiona E-evoluo kaj pridiskuti tiujn kun la regiona kunordiganto;
- helpi kompili la laborplanojn por stabiliga periodo kaj poste, sekvi plenumadon de tiuj planoj;
- stimuli interregionan kunlaboron kaj helpi pri ties planado;
- konsile kaj morale subteni la regionajn agantojn;
- informi REU-Estraron kaj rusiajn esperantistojn pri stato de la laboro.

Ĉiu menciita labordirekto subkomprenas renkontan agadon de la regionaj kunordigantoj. Ĝuste la homoj, dezirantaj sin provi sur tiu interesa kaj respondeca kampo, estas invitataj kandidatiĝi. Ajna homo rajtas ankaŭ kandidatiĝi personon el regiono por la regiona kunordiganto. La kandidato rajtas ne esti REU-membro kaj ne esti bonparolanta esperantisto. Gravas nur kuraĝo sin provi kaj deziro atingi rezultojn, bonajn por la E-movado.

La listo de la regionaj kunordigantoj por la tuta lando devas esti preta al la 15-a de septembro ☺ Ne reale, ĉu? Provu, kaj ni sukcesos!

Pli detale pri la temo eblas legi en la REU-paĝaro:

Regularo pri la regionaj kunordigantoj de REU (la 19-a Konferenco, Puŝĉino, 14.12.2002 http://reu.ru/dokumentoj/regionalaj_kunordigantoj)

Temo 1: Taskoj de la REU-respondeculo pri la regiona agado.

Temo 2: Kiu estu regiona kunordiganto

Viajn demandojn kaj proponojn pri la kandidatoj bonvolu direkti al:

mirinda.strigo@gmail.com

Irina Gonĉarova,
REU-respondeculo pri Regiona Agado

FORPASIS MARJORIE BOULTON (1924-2017)



La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino Marjorie Boulton.

Marjorie Boulton (naskiĝis la 7-an de majo 1924) doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-1962), de la Internacia Ekzameno (1961-1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Deguĉi, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski. Ekster la Esperanto-movado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo.

La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas Kontralte (1955), poezio, Cent ĝojkantoj, (1957, '77), poemoj, Virino ĉe landlimo: Drameto kaj skeĉoj (1959), Eroj kaj aliaj poemoj (1959), Zamenhof, Creator of Esperanto (1960, '80), anglalingva bibliografio, Zamenhof, aŭtoro de Esperanto (1962), Dek du piedetoj (1964), noveloj, Okuloj: novelaro (1967), Nia sango (1970), teatraĵo, Rimletero (1976), poemaro kun William Auld, Poeto fajrakora; La verkaro de Julio Baghy (1983), literatura studo, Faktoj kaj fantazioj (1984), prestiĝa legolibro, Ne nur leteroj de plum-amikoj; Esperanta literaturo - fenomeno unika (1984) kaj Du el (1985), poemaro kun Poul Thorsen, Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj (2005), eseoj. En 1999 aperis, sub la redaktado de Vilmos Benczik festlibro: Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton.

En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.



Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 700, 2017-08-31



ALEKSANDR KOTELNIKOV

La 2-an de septembro 2017 en 61-jara aĝo forpasis membro de REU Aleksandr Konstantinoviĉ Kotelnikov, bone konata multjara aktivulo de la Eo-movado en la urbo Volgograd, iama SEJM-aktivulo, fondinto de E-grupo en Volgodosko.

kaj tra tuta Sovetio kaj Rusio.

Ni elanime kondolencas al la parencoj, amikoj, samklubanoj, kamaradoj.

REU-Estraro

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio
